Josephine Hall

Annie Josephine Hall (19-an de aprilo 1865 - 5-an de decembro 1920) estis usona aktorino kaj sopranulino. Ŝi komencis sian karieron ludante rolojn en muzikaj filmoj kaj operetoj, starigitaj de Edward E. Rice de 1883 ĝis 1886, kiu konsistis el Broadvajaj teatraĵoj: The Pet of the Regiment, kaj Billee Taylor, en 1885. Ŝi aktoradis sceneje en ambaŭ teatraĵoj kaj muzikaj filmoj ĝis la komenco de la 20-a jarcento, ofte en verkoj kreitaj de Charles Frohman, kiu kontraktis ŝin por multo da jaroj.
Laŭ ŝia nekrologo eldonita de la usona ĵurnalo The New York Times en 1920, ŝi estis plej fama pere de sia kantado de la kanto nomata "Sister Mary Jane's Top Note" kaj siaj aperoj en Broadvajaj teatraĵoj: The Girl from Paris (1896) kaj The Girl from Maxim's (1899).
Hall emeritiĝis en 1904. Tamen ŝi kurte reaktoris en 1910 ludante rolon por la teatraĵo The Air King starigita de Klaw & Erlanger. Ŝi estis la patrino de Alexander A. Aarons, kiu havis longdaŭran kunlaboron kun Vinton Freedley. Alfred E. Aarons estis lia patro, kiu estis Broadvaja komponisto. Hall edziniĝis kun Alfred en 1899, naŭ jarojn depost la naskiĝo de Alex. Ŝi eksedziniĝis kun li en 1911. Ŝi mortis en 1920.

This is a translated and slightly adapted version of the Wikipedia article Josephine Hall. It is not a word-for-word translation.
This work is based on Wikipedia content and is available under the Creative Commons Attribution-ShareAlike License (CC BY-SA).